

esperanto sub \_\_\_\_\_

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

novembro-decembro 2005 • numero 78 | volumo 13 • numero 6



**Ĉe Radio 3zzz en Melburno  
dum la ĉiusemajna Esperanto-programo  
Svetislav Kanaĉki intervjuas**

**James Dwyer-on**

ISSN 1039-9380

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

Numero 77 • Vol 13.6 • Nov-Dec 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

## ELDONADO

Ĉi tiu numero estis preparita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, per uzo de la programo Mellel, kaj la tiparoj Futura, Onyx, kaj Minion Pro.

## ABONOJ KAJ PASINTAJ NUMEROJ

Membrokotizo/Abonprezo: \$A30.00. Pagu al: Libroservo de AEA

143 Lawson St, Redfern NSW 2016.

[libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *ESK* kostas A\$3.00+poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas el: <http://www.esperanto.org.au/>

*La suda kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

## Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643

York WA 6302

Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn de AEA, aŭ de NZEA.

© 2005 AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *ESK* preparis Igor de Oliveira Couto.

## En Ĉi Tiu Numero

21a somerkursaro 2006.....	3
Kongreso de NZEA 2006.....	5
Pri la somerkursaro Igor Couto).....	6
Subvencio por novaj instruistoj.....	7
Recenzoj: <i>Diverskoloro</i> kaj <i>La fotoalbumo</i> (rec. Donald Broadribb)....	8
Nekrologo: David Poulson (Vera Payne).....	10
Novaj ĉe la Libroservo.....	11
Biografio de Bob Felby (Katja Steele)	12
Vizito al historia Melburno (Franciska Toubale).....	14
James Dwyer vizitis nin (Svetislav Kanački).....	16
Ĉu la Universala Kongresoj estas elitaj? (Šandor Horvath).....	17
Odlo Bokserp (fotoj).....	18
Filmorecenzo: La somero senfina (rec. Tony Peterson).....	19
Respondo al Marcel Leereveld (Geraldo Mattos).....	21
Responde al János Petik (Rob Moerbeek).....	22
Skribas la legantoj: Terry Manley.....	23
For the Beginner (Donald Broadribb).....	25
Indekso de <i>Esperanto sub la Suda Kruco</i> 2005.....	29

## Sur la kovropaĝo

Dum la aŭstralia ĉiusemajna radio-programo en Esperanto, prezentisto Svetislav Kanački intervjuas gaston James Dwyer. Informoj sur paĝo 16.

La kompleta kolekto de *Esperanto sub la Suda Kruco* en formo pdf estas ĉiam legebla per Interreto ĉe la adreso: <http://esperanto.org.au>

# 21-a SOMERKURSARO de ESPERANTO

DE DIMANĈO LA 15-A JANUARO 2006  
ĜIS VENDREDO LA 27-A JANUARO 2006

okazonta ĉe

**KIANINNY CABINS RESORT**

Tathra Road, Tathra, NSW 2550

INFORMO: Retpoŝte: [AESK@Esperanto.org.au](mailto:AESK@Esperanto.org.au) aŭ [www.aesk.esperanto.org.au](http://www.aesk.esperanto.org.au)

## PROGRAMO

Dimanĉo 15-a januaro ĝis vendredo 27-a januaro, 2006 (inkluzive).

Ĝuu du semajnojn de intensa studado de Esperanto, la Universala Lingvo. Spertu sociajn agadojn kaj Esperantan kulturon per sinmergado en la lingvon.

## KURSOJ

La somerlernejo proponos kvar instru-nivelojn, de Nivelo 1 (veraj komencantoj) ĝis Nivelo 4 (altnivelaj esperantistoj). Unu el la kursoj je Nivelo 1 instruas nur infanojn. Aliaj lecionoj, per tuta mergado en la lingvon. Seminarioj kaj Baza kaj Meza ekzamenpreparado ankaŭ haveblas kiel elektoj.

## LOĜADO

Kianinni estas la plej alloga loko en sud-orienta parto de NSW. Ĝi situas en belega eŭkaliptarbaro plena de indiĝenaj sovaĝbestetoj. Apud luksaj kabanstilaj dometoj troviĝas lago, naĝejo kaj diversaj pilkludlokoj. Rigardu la lokon ĉe:

[www.kianinny.com.au](http://www.kianinny.com.au)

Popersona prezo por unu nokto kun ĉiuj manĝaĵoj:

Kvarpersona motel-stila ĉambro po.....\$52  
Tripersona motel-stila ĉambro po .....\$56

Dupersona motel-stila ĉambro po.....\$62  
Tripersona ĉambro en Cedrkabano po..\$66  
Dupersona ĉambro en Cedrkabano po..\$78  
Por infanoj subtrahu po \$8

## ALIAJ ARANĜOJ:

Partoprenu je ludoj, medistudo, paroladoj, teatraĵoj, kantado, dancado, promenado ktp.

## EKSKURSOJ

Estos okazoj kunveni socie kaj paroli Esperanton en amika etoso. Vojaĝu al Kanbero post la kongreso por viziti la Esperantobibliotekon.

## ADIAŬA FESTO:

\$32 (sen trinkaĵoj).

Somerkursarajn partoprenantojn kaj iliajn gastojn ni invitas ĉeesti adiaŭan feston kaj prezentadon de premioj.

Se vin interesas ĉeesti, montru esprimojn de intereso al ĉi tiu adreso, kaj ni diskutos aranĝojn kun partoprenontoj individue.

Retpoŝte: [aesk@esperanto.org.au](mailto:aesk@esperanto.org.au)

ENKETU FRUE POR AKIRI LA PLEJ  
MALMUTEKOSTAJN KAJ TAŬGAJN LOĜEJOJN!

# Aliĝilo:

Familia nomo:.....

Antaŭnomoj: .....

Nomo por la nomŝildeto: .....

Aĝo:

Adreso: .....

.....

Poŝtkodo:

Telefonnumeroj:

(tage).....

(vespere) .....

Retadreso:.....

Enmetante la kurskotizon kaj rezerv-  
antaŭpagon, mi konfirmas mian aliĝon al  
la 21-a Aŭstralia Somerkursaro.

*Plena kurskotizo* \$232. (\$250 post 1 nov  
05)

*Plentempa studento* \$114. (\$140 post 1  
nov 05 )

(Numero de Studentkarto .....

Antaŭpago \$100 kontraŭ rezervi loĝ-  
lokon en Kianinny Feriejo — (ne retro-  
pagebla)

\$32 por Festmanĝo vendredon la 27-an  
(malinkluzivas trinkaĵojn)

ENTUTE : \$ \_\_\_\_\_

Okaze de nuligoj: Ni retenos 10% el via  
antaŭpago por administrado.

Subskribo:.....

Dato:.....

Bonvolu uzi unu aliĝilon por unu persono.  
Uzu preslitterojn majuskulajn kaj sendu la  
aliĝilon kune kun via ĉeko al:

AUSTRALIAN ESPERANTO SUMMER

SCHOOL 2006

Libroservo de AEA  
143 Lawson Street  
Redfern NSW. 2016, Aŭstralio

Telefono +61 (0)2 6495 0395,  
Retadreso: [aesk@esperanto.org.au](mailto:aesk@esperanto.org.au)

Plej verŝajne mi aliĝos al: (Substreku kaj  
indiku viajn unuan kaj duan preferojn)

Nivelo 1 (Veraj komencantoj)

Nivelo 2 (Progresantoj)

Nivelo 3 (Meznivelanoj)

Nivelo 4 (Spertaj uzantoj)

Esperanto-forumo

Elektaĵo: Kantado

Elektaĵo: Naturmedio

Mi intencas trapasi la:

*Bazan*

la *Mezan* ekzamenojn.

Mi estas:

lakta

vegana

vegetarano

Mi bezonas:

senglutenajn manĝaĵojn

senlaktan manĝaĵojn

Mi havas la jenan specialan problemon  
(ekz. prisanan):.....

.....

.....

*Ne temas nur pri studado en la Somerlernejo***Ludu, ludadu kaj ludu plu!**

Kanuumado, arkpafado, grimrado kaj volejbalo estas nur iuj el la aktivadoj haveblaj por ni en la feriejo Kianinny —ĉio ĉi estos inkluzivita en la prezo de via loĝado. Ĉu tio sonas kvazaŭ troigo? Vi eble komencos vian tagon per revigliga piedumado al la marbordo, kie vi, post rapida jogumado, naĝados iomete!...

**Komunumaj Forumoj**

La ĉeestantoj rajtos preni parton en la posttagmezaj forumoj, kiuj prezentos diversajn projektojn kaj laborgrupojn el niaj lokaj Esperanto-komunumo kaj movado. Konstatu la multajn ekscitajn fakojn, en kiuj Esperanto uzatas en tuta Aŭstralio, kaj ankaŭ kiel vi persone povos kontribui!

**Preparu vin por la Oficialaj****AEA-Ekzamenoj**

Ĉiu ajn lernanto deziranta ekzameniĝi en la oficialaj AEA-aj BAZA aŭ MEZA ekzamenoj por akiri diplomo(j)n, povos preni parton en specialaj preparlecionoj, kiuj okazos ĉiun postagmezon. Tiuj senpagaj lecionoj plibonigos la scion de la lernanto pri la gramatiko de Esperanto, kaj ankaŭ helpas alfronti ekzameniĝon kun pli da memfido!

**Niaj membroj prezentos**

Ĉeestu ĉiuvespere ion alian pri multaj temoj prezentotaj de niaj Esperanto-amikoj, kiuj deziras dividi kun ni, el siaj vivoj profesia kaj persona, ion atentindan pri siaj vojaĝoj kaj vivspertoj. □

## **KONGRESO DE NZEA EN WELLINGTON EN FEBRUARO DE 2006**

La venontjara kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en Wellington ekde la sabato, 4-a de februaro ĝis la lundo, 6-a de februaro.

**TUJ MENDU VIAN FLUGBILETON!**

Pro la fakto ke okazos internacia rugbea konkurenco en Wellington dum la samaj datoj kiel la kongreso, ni sugestas ke vi mendu vian flugbileton kiel eble plej baldaŭ.

La kongreso komenciĝos oficiale je la 1-a ptm la 4-an de februaro. Tial, ni sugestas ke vi mendu vian flugbileton por alveni en Wellington tiun matenon.

La kongreso finiĝos je la 4-a ptm la 6-an de februaro. Tial, ni sugestas ke vi mendu vian flugbileton por hejmeniri tiun posttagmezon/vesperon (krom se vi volas resti pliajn tagojn en Nov-Zelando).

**KONGRESEJO**

La kongresejo estas Weir House, bela studentloĝejo apud la universitato preskaŭ en la urbocentro de Wellington. Tie okazis NZEA kongreso 1999.

**LOĜADO EN WELLINGTON**

Por ripozigi la korpon post tre aktivplena kongresa tago, eblas mendi ĉambron en multaj urbocentraj hoteloj

kaj apartamentohoteloj — sed mendu rapide ĉar la hoteloj certe estos plenaj pro la amaso da vizitantaj rugbeuloj en Wellington. Tamen, eblas ankaŭ mendi dormoĉambbron en Weir House, je pornokta prezo de \$50 (inkluzive de matenmanĝo). Vidu:

[www.weirhouse.co.nz](http://www.weirhouse.co.nz).

### PROGRAMO

Ni proponas tre plenan programon. Kiel kutime, ni intencas organizi lingvajn sesiojn kie ni invitas vin fari demandojn pri gramatikaj punktoj, esprimoj ktp. Tamen, la programo dependas de la kongresanoj mem! Ni petas ke vi

ĉiuj bonvole pretu prezenti programeron. La kutima oficiala bankedo okazos en urbocentra restoracio la dimanĉan vesperon. Oni pagos aparte al la restoracio.

### KIEL ALIĜI?

Por ekster-novzelandanoj, bonvole skribu al [brm.nzea@xtra.co.nz](mailto:brm.nzea@xtra.co.nz) por informi nin se vi intencas ĉeesti, aŭ se vi havas demandojn pri la kongreso, antaŭ la 31-a de decembro de 2005.

La aliĝkosto, pagebla ĉe la kongreso mem, estas NZ\$50 por la tuta kongreso, aŭ NZ\$20 por tago. □

---

## PRI LA SOMERKURSARO

de Igor de Oliveira Couto

Mi devas konfesi, ke por la novaj esperantistoj — kia mi — la propono okazigi la Somerkursaron de AEA nur 2-jare, anstataŭ ĉiujare, estas iomete surpriza. Mi klarigas kial.

Laŭ mia kompreno — kaj verŝjane mi tute miskrompenis la aferon — la ĉefa celo de AEA estas precize disvastigi Esperanton, kaj pligrandigi kaj plifortigi nian lokan movadon. La Somerkursaro estas la ĉefa evento de nia loka kalendaro, kaj allogas ĉiam multajn novajn esperantistojn — mi mem ne partoprenus la movadon, se la Somerkursaro de 2000 ne estus okazinta en Sidnejo. Do, oni devas demandi: ĉu la neokazigo de la Somerkursaro ĉiujare pli helpus la movadon?

Mi bone komprenas la vidpunkton

de Marcel Leerveld, kiam li mencias, ke la organizado de la Somerkursaro estas granda laboro, kaj ke ne ĉiam estas disponebla grupo, kiu senhezite volontulas fari ĝin. Tiu okazas, precipe ĉar nia komunumo malkreskas — ni havas malpli da membroj ĉiujare — kaj AEA ĝis nun ne havis rimedon por helpi niajn malgrandajn volontulajn grupojn organizi tiel grandan eventon. Sed, tiu situacio nun ŝanĝiĝas. Ĉi-jare, Penny Vos starigis specialan nacian volontulan grupon de AEA, kies celo estas precize helpi la organizadon de la jara Somerkursaro. La nomo de la grupo estas AEASS ("AEA Summer School"). Tiu estas nova grupo, tamen eĉ post nur kelkaj monatoj, ĝi estas bone organizita, kaj ties volontuloj jam vigle la-

boras, ne nur por helpi la aranĝojn de la Somerkursaro de 2006, tamen ankaŭ jam por helpi la aranĝojn por 2007. Tio estas ege bona indiko, ke ni nun atingas pli profesian nivelon de organizado, kaj ke nia laboro por okazigi la Somerkursaron estontece fariĝos multoble pli facila.

Mi opinias — verŝajne malprave — ke se la okazigo de la ĉiujara Somerkursaro (aŭ de iu ajn alia formo de antaŭenigo de Esperanto) donas al AEA problemon, AEA devus peni solvi la problemon, anstataŭ decidi, ke estus pli bone simple havi malpli da subteno, ĉu ne? Malpli da subteno certe ne estas kion ni bezonas en ĉi tiu momento de nia historio.

Ŝajnas al mi ankaŭ, ke oni ne plendas pri la fakto, ke ni devas renkontiĝi ĉiujare — konsiderinte, ke la jarkunveno de AEA, laŭleĝe, devas okazi ĉiujare — sed pri la fakto ke dum niaj jaraj renkontiĝoj okazas samtempa kursaro. Kial tio malagrblas al la spertuloj, mi ne bone komprenas. Malgraŭ la fakto, ke la nomo de la evento estas “Somerkursaro”, la vero estas, ke oni tute ne bezonas pagi, nek ĉeesti kurson.

Oni povas veni nur por partopreni la jarkunvenon de AEA, kvazaŭ la kursoj ne estus okazantaj. Dum la renkontiĝo, ja okazas klasoj dum la mateno, sed dum la posttagmezo (kaj nokto) okazas multaj aliaj aferoj — fakaj prelegoj, publikaj forumoj, volon-

tulaj diskutgrupoj, ekskursoj, ktp. — kiuj estas multe pli taŭgaj por la spertuloj, ol por la komencantoj. Do, se oni ja estas preta veni kaj partopreni jarkunvenon ĉiujare, faru tion dum la Somerkursaro! — kaj forgesu, ke la nomo de la renkontiĝo estas “Somerkursaro”

La Somerkursaro estas nia plej grava evento, en la tuta lando. Ĝi fakte estas la ĉefa agado de AEA, kaj ĝia ĉefa disvastigo de Esperanto — kaj de la esperanta movado — meze de la ĝenerala publiko en nia lando. Laŭ mi, kiel stulta, nova esperantisto, sen multe da sperto pri nia movado, ŝajnas al mi ke estus granda perdo por la movado, se tiu evento okazus pli malofte. Tio montrus, ne nur ke nia loka movado sendube malvigliĝas — kaj mortas — sed ankaŭ, ke niaj lokaj esperantistoj havas nek sufcian volon nek sufcian instigon por fari la bezonatan laboron por revigligi ĝin. Bonvolu pruvi, ke mi malpravas.

[igor@pixelmedia.com.au](mailto:igor@pixelmedia.com.au) □

---


## Subvencio por novaj instruontoj

Ni reatentigas vin ke ekzistas mil-dolara subvencio havigebla por ke la federacioj rekrutigu instruistojn por studi kaj instrui Esperanton. Jam kelkaj instru-rekrutoj troviĝis; sed ni deziras pli!... □

## 👁️ • recenzas via redaktoro

**TREVOR STEELE:** *Diverskoloro*. Kalin-  
ingrado: Sezonoj, 2005. 112p. broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷🍷



Trevor Steele estas verŝajne la plej aktiva kaj talenta verkisto en Esperanto nuntempe, kaj rangas inter la plej talentaj

aŭtoroj en la historio de nia lingvo.

La modesta aspekto de ĉi tiu libro ne trompu vin. En ĝi estas aro da eseoj — kaj rakontoj — trafaj, tre aktualaj, esprimantaj senmaskan komenton pri nuntempaj eventoj — pensigaj, ne ĉiam nepre prikonsentendaj, sed honestaj kaj konvinke prezentitaj.

Kelkaj artikoloj jam aperis en diversaj gazetoj, kelkiuj en *ESK* mem, aliaj aperis aliloke, aŭ estas por la legataro tute novaj.

La unua parto titoliĝas “Koloroj de Hindio”, kaj tre honeste, kaj malkaŝe, montras al ni tiun landon kia ĝi aktuale estas. La bildo estas multefaceta.

“Koloroj de aliaj landoj” estas la dua parto. En ĝi estas eseoj pri aŭstraliaj aborigenoj (unue aperigitaj en *ESK* en 1995), Litovio, Honkongo, Brazilo, nenomita balta lando (amuza epizodo sed ankaŭ serioza).

Parto tri “Recenze/reage” enhavas kelkajn tre gravajn eseojn, el kiuj mi subtreku “Business as usual” kaj la tuj-

sekvan “Estimata s-ro Kertesz”, kiuj estas grave aktualaj — kaj avertaj. Kvankam eble vi ne konsentos kun ĉiuj liaj vidpunktoj (tamen, mi mem, jes ja), ili estas profunde konsiderendaj. Same, sed aliteme, “Iluzioj kaj spontaneco”.

“Koloroj de la infanaĝo”, la kvara parto, vekos kelkajn memorojn en, verŝajne, preskaŭ ĉiuj legantoj.

Fine, parto kvin, “Noveloj”, regalas nin per ne nur spritaj sed rimarkinde talentoplenaj fikciaĵoj.

Do, entute, bukedo da tre diversnaturaj verketoj (ofte nur du-tri-paĝaj), el kiuj kelkaj fariĝos sendube historiaj kuriozaĵoj, kaj aliaj restos eterne ĉe la pinto de nia literaturo.

Ĉu mi tro entuziasmas? Pri tio vi mem juĝu. Sed por fari tion, vi devos unue legi la libron!

Diverskoloro aĉeteblas ĉe Trevor Steele, 52 Exmouth Road, Glanville SA 5015. La prezo estas \$20 + afranko. □

**TREVOR STEELE:** *La fotoalbumo, dua volumo*. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 2005. 165p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

La unua volumo de ĉi tiu biografio romano aperis en 2001. Ĉi tiu volumo temas pri la epoko de la Vjetnamia milito, kaj ĉefe rolas la vivoj de Sean kaj David O’Shea. Se necesas izoli la ĉefajn temojn, eblas diri ke ili estas:

(1) La vjetnamia milito, kaj la



divido de la fratoj O'Shea kiun ĝi kaŭzis: Sean, "viktimo" de la usonaŭstralia propagando pormilita; David, fervora kontraŭmilita agitanto; Bernie, kiu en la koro de sia animo rifuzas mortigi (li malamas fiŝkaptadon, ĉar li malamas mortigi fiŝojn — kio kaŭzas problemojn, ĉar ne nur la patro, Paddy, sed preskaŭ ĉiu alia persono en la romano amas fiŝkaptadon) — sed malgraŭ tio li akceptas soldatiĝi por la vjetnamia milito, ĉar tio estas "lia devo".

(2) La prireligia disputo en la familio O'Shea: David estas fervore kontraŭ-religia; la patro Paddy estas ĝenerale senreligia; la ceteraj familianoj, inkluzive de la edzinoj, varias inter gradoj de religia fanatikeco.

(3) La laborproblemoj, kaŭzitaj de la ekmalŝanĝo de la patro Paddy, kaj la neceso de la ceteraj familianoj ne nur lin mem prizorgi, sed ankaŭ lian segistan entreprenon.

Sed la kvalito kiu elstarigas la talenton de Trevor Steele estas ne la temoj.

Ĝi estas la humana kapablo senti kaj prezenti la animojn de la priverkatoj. Lia nekonvencia maniero prezenti tion lokigas lin inter la majstroromanistoj. Jes, li ja kapablas verki bonajn intrigojn (nur vidu la klimakson de lia romano *Neniu ajn papilio!*); tamen tio estas vere flankafero. La historio konsistas el personoj, kaj la agojn de la personoj instigas iliaj personaj spertoj, kredoj, fantazioj, emoj, sentoj — ne ia fikcia "scienco", ĉu marksisma, ĉu

merkatisma, ĉu teologia, ali-isma aŭ -ologia — kaj la vera vivo konsistas el tiuj personoj. Neniu priskribo de la historio estas aŭ objektiva aŭ subjektiva, ĝi estas la pensoj kaj agoj de antaŭaj personoj, kiel ilin vidas la menso kaj memoro kaj kompreno de la verkanto. Tion tre elegante esprimis Steele en la komencaj paĝoj de *Neniu ajn papilio*, kaj li plene pravas.

Multarilate, La fotoalbumo estas spegulo de Aŭstralio dum la 1960-oj, kiel ĝin konis Trevor Steele.

Ĉu vi ĝuos *La fotoalbumon*? La fotoj en ĝi estas vortofotoj, ne vidofotoj. Ĉu vi, kun la verkinto, povas unue percepti, pervorte, la eksteran aspekton de evento, kaj poste esplori la internon de la evento por kompreni ĝin? Mi esperas ke jes. Ĉu vi konsentos kun la aŭtoro pri la Vjetnamia Milito, religiaj temoj, ĉiutagaj rilatoj inter familianoj? Mi ne scias. Sed por mi *La fotoalbumo* estas historia romano kiun mi ne volus mankiĝi al mi. *La fotoalbumo dua volumo aĉeteblas ĉe Trevor Steele, 52 Exmouth Road, Glanville SA 5015. La prezo estas \$25 + aŭfranko.* □

 por ridigi vin 

Plejpatre ĝusta

Temo: La looonga nokto de la muzeoj. Nu, je la unua [horo] ni scias la finan nombron de la patrorenintoj: 675!!!

El *La ondo de Esperanto*

## NEKROLOGO: DAVID POULSON

verkis Vera Payne

Je la 5-a de Septembro 2005 mortis en Tajlando bona amiko de Esperanto.

David naskiĝis en Anglio, sed loĝis dum pluraj jaroj en Pertio. Kiam mi unue konatiĝis kun li, li deĵoris en la biblioteko de Universitato Edith Cowan, ĉe la kampuso Churchlands, apud Floreat. Poste, li translokiĝis al la nova kampuso ĉe Joondalup, kie li estis specialisto en la komputila fako.

Li ofte verkis artikolojn pri Esperanto en la universitata revuo, kaj plurfoje estis intervjuita pro lia interesiĝo pri nia internacia lingvo. Li regule eldonis flugfolion nomatan *COLLOQUIUM* en kiu li verkis artikoletojn kaj en Esperanto kaj en la angla.

Li redaktis, kaj plejparte mem verkis, bultenon por korespondaj studentoj en Aŭstralio, *Your Esperanto Bulletin*. Li sendis ekzemplerojn al kursgvidantoj kaj al la administrantoj de la korespondaj kursoj kiujn verkis kaj estris John Moore, (poste Dianne Lukes kaj finfine Hazel Green). La unua redaktoro de la Bulteno estis John Moore; David prenis la taskon ĉirkaŭ 1996. Li ankaŭ verkis multajn interesajn artikolojn pri Esperanto, por meti en interreta paĝaro, inter 1997 kaj ĉ. 2000, antaŭ ol estis la nuna abundo de informo pri Esperanto en Interreto.

Mi memoras, ke li estis en elektro-

nika korespondo kun Esperantistoj mondvaste.

Antaŭ ol mi akiris komputilon, David estis tre helpema kiam ajn mi bezonis informon pri kio ajn koncerne Esperanton. Mi petis, kaj li respondis, havante ne nur la novan komputilomirindaĵon, sed ankaŭ ĉiujn el la bibliotekaj libroj je sia dispono.

David estis patro de Emma kaj Ted, kiuj loĝas en Usono, kaj de lia dua edziĝo naskiĝis Sarah kaj Louise. Ĉiuj el la infanoj estas nun plenkreskaj.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, post la disiĝo de sia dua geedziĝo, li loĝis kaj laboris en Chiang Mai, en Tajlando, kie li havis postenon en Universitato Maejo. Malfeliĉege, trafis lin kancero de la laringo, kaj dum ĉirkaŭ du jaroj li tute ne povis paroli. Tamen li povis skribi, kaj daŭre korespondis per leteroj kaj epoŝto.

David petis Esperanto-libron, kaj skribis en majo, ke li vere ĝuis legi *Blankaj Noktoj* de Dostojevskij.

Bedaŭrinde, post pluraj suferigaj operacioj kaj ege lacigaj, intensivaj terapioj kemiaj kaj radiaj, li pli kaj pli malfortiĝis, kaj forpasis unu monaton post sia 63-a jaro. Plia pakaĵo enhavanta Esperanto-libron atingis lin tro malfrue.

Restu en paco, kara Davido. □

## NOVAJ ĈE LA LIBROSERVO

*Tinĉjlo en Tibeto*, nove eldonita libro en la serio Tintin. Ĝi estas granda bunta, bindita libro eldonita en 2005. Prezo: \$20.90 + afranko.

*Traduku* by William Auld. This book contains 56 little texts in English and then gives a translation into Esperanto and quite a few comments about the translation. A very useful book to make sure you don't stay at the beginner's level. Published in 2004, \$21.40 + postage


*Okulo*, Esperanto-lernolibro, tute en Esperanto, de Stefan MacGill, por infanoj 6-10jaraj. En ĝi estas multaj bildoj kaj kelkaj koloroj. Prezo: \$8.05 + afranko.

*Okulo (gvidilo)* kostas \$8.05 + afranko.

*Arboj en Aŭstralio kaj suda Eŭropo*, libreto 20paĝa de Lilli Giloteaux kun multaj desegnoj de arboj kaj folioj, vortaroj en 6 lingvoj: Esperanto, angla, germana, nederlanda, franca, plus sciencaj nomoj. Prezo: \$4.15 + afranko.

*Mummy, why can't we all speak the same language*, a book for children with lots of quiz questions about different languages. See previous issue for review. It is still available for \$5.95 but selling fast.

Ni mendis plurajn ekzemplerojn de la tre popularaj vidbendoj *Mazi en Gondolando*, kiuj devos atingi la libroservon tre baldaŭ. Bonvolu epoŝti al [libroser@ans.com.au](mailto:libroser@ans.com.au) por pli da informo. □



### RADIO 3ZZZ

#### *nia aŭstralia Esperantolingva radio-programo*

Kvankam la nombro da Esperantolingvaj radio-programoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia Esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskulteblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe [www.3zzz.com.au](http://www.3zzz.com.au). La vario de la enhavo — muziko, kurso, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturajoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiun lundan posttagmezon. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — plus la senpaga programo RealPlayer (elŝutebla ĉe [www.real.com](http://www.real.com)). Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman esperantolandeton!

# BIOGRAFIO DE BOB FELBY

de Katja Steele



Bob naskiĝis la 11-an de julio 1932 en la ĉefurbo de Danujo, Kopenhago.

Li estis lernanto plejparte en la malfacilaj militaj jaroj (1939–46) kaj eklaboris jam kiam 14-jara, unue en hufferfabriko. Poste li estis ŝipkonstruisto, bakisto, malsanuleja laboristo, kokinbredisto kaj multo alia en dudeko da diversaj laborlokoj, ne nur en sia hejmlando, sed ankaŭ en Anglujo kaj Aŭstralio. Pleje li ŝatis la noktogardistan postenon (1962–74, en Danujo). Pro sia pacamo kaj rifuzo militservi li pasigis la jarojn 1954–56 en punlaborejo “Gribskov”, dorlote kromnomita “K. Z. Lager Gribbenwalde”.

De 1974 Bob loĝas kun siaj edzino kaj tri gefiloj en Aŭstralio. Ili havas kvin genepojn.

Bob membras en Universala Esperanto-Asocio (UEA) ekde 1951, Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) ekde 1974, Esperanto en Sudaŭstralio ekde 1979, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj li estas registrita Mondcivitano. Pro liaj meritoj AEA honoris Bob-on per titolo “Fratulo de AEA” en 2005.

Krom la gepatra dana kaj Esperanto li parolas angle kaj interkompreniĝas

ankaŭ norvege, svede kaj germane.

*Kiamaniere vi esperantistiĝis?*



Dum la okupacio de Danujo dum la dua mondmilito mi devige lernis la germanan. Kvankam tre

plaĉis al mi lerni ion, kio povas alproksimigi min al aliaj homoj, mi ne sukcesis bone lerni tiun lingvon. Kelkajn jarojn post la fino de la milito mia patro proponetis al mi lerni la internacian lingvon, Esperanto. Unue mi lernis ĝin el *Esperanto for ungdommen* de L. Friis. Poste mi trastudis alian libron de la sama verkinto, sed kun la helpo de tre bonkora instruistino el Jutlando, s-ino Graule. Mi lernis iom pli per koresponda kurso. Tiam en la vesperlernejo instruis min rusa instruisto, Leonid Vasiljef. Li kaj mi fariĝis bonegaj amikoj.

*En kiuj Esperanto-aranĝoj vi prenis parton?*

Mi prenis parton en kelkaj somerkursaroj en Helsinoro, Danujo en 1952 kaj poste. Mi prenis parton ankaŭ en kelkaj danaj kongresoj, en Dan-sveda Esperanto-tago, en kelkaj ekskursoj al Svedujo, En universalaj kongresoj en Kopenhago en 1956, en Tampereo en 1995, kaj en Adelajdo en 1997. Mi ĉeestis tre multajn aŭstraliajn kongre-

sojn kaj somerkursarojn, kaj preskaŭ ĉiujn kunvenojn aranĝitajn de “Esperanto en Sudaŭstralio”.

*Vi ne nur ĉeestis/-as, sed ankaŭ gvidas, kunorganizas, instruas, redaktas, skribas...*

Dum 1967-68 mi estis prezidanto de “Frederikssunda Esperanto-klubo” kaj samtempe redaktis



ĝian membrogazeton *Frederikssundaj Frenezaĵoj*.

En Adelajdo mi estis sekretario, poste vicprezidanto, daŭre mi estas bibliotekisto (la libroj estas en mia hejma laborĉambro, dorlote nomita “la oficejo”), kaj redaktanto de nia cirkulaĵo *Tamen Plu*, kiun mi komencis iam en la 1980-aj jaroj. Mi helpis prepari la Dan-svedan Esperanto-tagon en Frederikssund, ekskursojn, marŝojn, zamenhoffestojn, AEA-kongreson en Adelajdo en 1982, kaj plurajn somerkursarojn kaj kongresojn adelajdajn. En 2005 AEA eldonis mian biografion titolitan *Malgrava historio pri mia vivo*.

*Kiu flanko de la Esperanto-movado plej altiras vin?*

La retaj kontaktoj kaj turismo. Estas tiom da landoj en la mondo, kiujn mi ankoraŭ ne vidis...

*Ĉu vi havas krom Esperanton iun alian ŝatokupon?*

Jes, muziko tre ĝojigas min. Kiam 14-jara mi jam ludis en mandolinorkestro en Kopenhago. Mi ludis la duan mandolinon, poste ankaŭ havajan gitargitaron, eĉ havajan gitaron. Plej amuze estis ludi la t.n. “subkontrabasbalalajkon”. Nuntempe mi havas du mandolinbangojn, unu mandolinon, unu ukulelon, unu akordionon, kaj unu balalajkon. Mankas al mi nur ke mi lernu bone ludi ilin!



*Kiuj estas viaj grandaj revoj?*

Mian tutan vivon mi revis pri tutmonda ĉiamdaŭra paco, sed evidente la mondgviantoj havas aliajn ambiciojn. Plaĉus al mi se estus nur unu registaro en la mondo, kondiĉe ke ĝi zorgu ankaŭ pri ĉiuj el ni, kaj ne nur pri si mem.

*[Se vi volas scii pli pri Bob, nepre legu lian biografion. Vi ekscios pri lia rilato kun la nobelpremiito R. Selten, pri la serĉado de vero en la Kriŝno-movado, pri la Esperanto-instruado en la puntendaro kaj pri multo pli.]*

[El *Tamen plu*] □

## 🦋 por ridigi vin 🦋 Kolkera kernilo

Ekzerco inspirita de la kernolibro de B. Kolker “Vojaĝo al Esperanto-Lando” (Komencanto 2003: 5. Trovis Ionel Onet) El *La ondo de Esperanto*

## VIZITO AL HISTORIA MELBURNO

raportas Franciska Toubale

Sabaton la 24an de septembro 2005 dudeko da esperantistoj kuniĝis sub la horloĝoj de la stacidomo en Flindersstrato por malkovri, sub la gvidado de Bernie Heinze, lokojn ligitajn al la historio de la laborista movado post la dua mondmilito, tiam sub la influo de la komunista partio.

La unua haltejo estis en Elizabethstrato. Je la numero 17 staris la Aŭstralia Libro-Societo, kiu poste fariĝis la Internacia Librovendejo, nun anstataŭita de manĝejoj. En la kvindekaj jaroj mankis libroj pri la laborista movado, komunismo kaj la landoj, en kiuj venkis komunismo. Kelkaj memorindaj libroj de tiu periodo estas tiu de Frank Hardy *Power Without Glory* (Potenco sen Gloro), kiu estis bindita en la hejmo de komunistaj familioj; aŭ la ne tiom interesa novelo *JOURNEY into the Future* (Vojaĝo futuren).

Bernie memoras kiam li akompanis sian patron tie. Heather kaj Ivan Heldzingen renkontis unu la alian ĝuste en tiu librovendejo, kaj Sheila Parish akiris sian unuan libron pri feminismo, la *Vivo de Florence Nightingale*.

Ne tre for, sur la alia flanko de la strato je la numero 66, en la ANZ-banko eksplodis bombo en la jaro 1972. Tie en la Centro pri Konsiloj al la Migrintoj troviĝis manekeno en jugo-

slava nacia kostumo. Samtempe eksplodis bombo en la apartamento de migrito el Jugoslavio, kiu forte kontraŭstaris la dekstrulojn de la kroata komunumo en Melburno. Neniu estis vundita. Kvankam Asio sciis pri la intenco de la “Ustaŝi”, ĝi ne intervenis.

Tre rapide la tramo kondukis nin al la katedralo Saint Patrick, kie gargojlo neatendite montras la vizaĝon de Jeff Kennett, la antaŭa ĉefministro de Viktorio. Tio estis la ideo de Tom Carson, la skulptisto kiu riparis la gargojlon en 1992.



Apude troviĝas la hotelo Sheraton, nun Mercure, kie la Australia Servo pri Sekretaj Informoj (ASIS) en 1983 pruvis sian ekzistadon per invado de la hotelo kun armiloj, post detruado de la

pordoj per forĝistaj marteloj. Ili timigegis la klientojn, malbone traktis la ĉefkuiriston postlasis \$365,400 pro la damaĝo. Kvankam la polico rapide arestis ilin, ĉar la personaro de la hotelo tute simple notis la numeron de la aŭtomobilo, kiu atendis ilin, la membroj de ASIS ricevis neniun punon.

Nia lasta vizito estis en “Trades Hall”, kie nun troviĝas internacia librovendejo. Multaj ĉeestantoj aĉetis la libron *Radikala Melburno — La ena malamiko* (Radikala Melbourne — The

Enemy Within) de Jeff kaj Jill Sparrow, en kiu troviĝas multe pli da rakontoj.

La ekskurso finiĝis per komuna manĝo apud la viktoria bazon. Survoje retenis nian atenton la kolono starigita memore al la marŝoj de la laboristoj je la komenco de la dudeka jarcento por akiri la ok horojn da laboro, ok horojn da amuzo, ok horojn da dormo.

Ĉu ĉio tia apartenas al la pasinteco? Tiam la malamikoj estis ĝenerale la maldekstruloj; sed nun ĉu ili ne estas la teroristoj? □

## 🦋 por ridigi vin 🦋

### Likva ovo de Kolumbo?

Se eblas, ni bezonas unu estraranon el Suk-Ameriko.

(*Libera Folio* 11 feb 2004, “Lee Chong-Yeong volas atingi internaciajn organizaĵojn”)

### Esprimo de sentoj al elektantoj

Realece elektiĝas ne nepre la objekte plej taŭga kandidato sed tiu kiu sukcesis, foje per puraj emociaĵoj, konkreti la korojn de elektantoj.

(Ilja B.S. De Coster, 20 dec. 2003, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/6282>)

### Vere nedankinde

Cetere, dankon pro via danko pri la UEA-gratulejo.

(Roy McCoy, 28 dec. 2003, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/6343>)

### Fumkulta sepulto

La cindrujon de Irja Klemola oni enterigis en Sääksmaki. (Esperantolehti 1996: 1)

### Je l' vojomez' de nia vivo tera?

De: membro de UEA / To: [uea@inter.NL.net](mailto:uea@inter.NL.net) / Temo: Kotizo de 2004 / Mi sendis ... Bonvolu, certigi al mi ke vi ricevis tiun ĉi mezaĝon. (Rimarkis Ionel Oneț)

El *La ondo de Esperanto*

## JAMES DWYER VIZITIS NIN

de Svetislav Kanački



James Dwyer kaj Svetislav Kanački  
ĉe Radio 3zzz

En aŭgusto ni havis vizitanton ĉe radio 3zzz, S-ro James Dwyer el Tasmanio. Li vizitis sian fratinton en Melburno.

James estas junulo kiu komencis lerni Esperanton 2 monatojn antaŭ sia vojaĝo al Rusujo, kie li restis dum monato kaj ĝuis Esperanto-etoson dum sia restado. De tie li vizitis Koreon, kie li restis monaton, ankaŭ inter esperantistoj.



James Dwyer parolas

Dum la mallonga intervjuo li rakontis esperante, kun iom da stagnetado dum li serĉis la korektajn vortojn kaj esprimon pri sia tuta sperto inter nekonatoj — pri la amikaj akcepto kaj etoso, pri kiuj li miregis: per Esperanto eĉ malflua parolanto povas komuniki. Li ekamis la lingvon Esperanto kaj havas intencon enkonduki Esperanton en Tasmanio.



Svetislav Kanački ĉe la miktrfono

Ĉar James jam estas aktiva en komunuma radioprogramo, kaj por li ne estas io nova en la tekniko uzata en studioj, li planas kompili programon por radio. Liaj spertoj en Rusujo, kie li la unuan fojon aŭskultis nian Esperanto-Radio-Programon, kaj eĉ pliekiam li estis nia gasto konatiĝante kun mi kaj Laslo Fakash, donis al li ideon komenci Esperanto-radian programon en Tasmanio. □



# ĈU LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ ESTAS ELITAJ?

## Mia sesa Universala Kongreso: Vilnius, Litovio de Sandor Horvath

### KION MI ŜATIS?

— La alloga bonveniga servo. Aleksejus vere helpis, eĉ aĉetis telefonkarton por mi.

— La multaj reklamoj kaj afiŝoj tra la urbo.



Pat Palmer apud unu el la multaj reklamoj pri la Kongreso en Vilnius

Dum antaŭaj kongresoj mi ofte sentis ke ni estas forglutitaj en la grandega urbo (Berlino) sed ĉi-foje mi vere havis la senton ke oni remarkis la esperantistojn.

Mi konscias kiom da laboro tio postulas kaj mi gratulas la LKK-on.

— La gaja etoso ekster la hotelo dum la interkona *vespero*.

— *Nia simpla, sed komforta loĝejo (Paupio)*

— *La tri eventoj pri la kongresa temo.*



La monto de Tri Krucoj — religia monumento pri evento en la 14a jarcento. La krucoj estas modernaj re-produktaĵoj de pli fruaj plurfoje detru-itaj kaj rekonstruitaj.

Estis bone scii ke ni daŭrigas centjaran tradicion kaj eltrovi ekz. ke la hungaroj devis trakti plendojn de la nordkorea ambasadoro pri la manko de ilia flago dum la budapeŝta kongreso en 1966.



“Zepelinoj” — tradicia manĝaĵo litova: terpoma “pastaĵo” ĉirkaŭ muelita bovajo.

— Finfine manĝi “Zepelinojn”, unu el la tradiciaj pladoj de Litovio. Kompreneble ili estas bongustaj kaj mi ne trovis eĉ unu litovon kiu ne ŝatas ilin. Tamen oni devas limigi la kvanton.

— La aloga zamenhofa poŝtmarko. Ĝi instigis min skribi eĉ pli da poŝtkartoj.

Jes ankaŭ mi sentas ke la universalaj kongresoj estas sufiĉe elitaj.

Kiel ni rajtas nomi ĝin “universala” kiam preskaŭ neniu povas partopreni el Afriko, Sudameriko kaj aliaj malriĉaj partoj de la mondo?

Precipe la tri venontaj lokoj (Florenco, Jokohamo, Roterdamo) certe ne helpas ebligi la partoprenon de malpli financpovaj esperantistoj.

Sed kion fari?

Mi ankaŭ devas fari kelkajn pozitivajn kritikojn... kvankam mi konscias ke tiuj problemetoj estas ekster la influo de la LKK.

— Kial oni vendas semajnajn aŭtobusajn biletojn mur en unu (au eble du) lokoj?

— Kial oni ne vendas varmegan ĉokoladon en ĉiu kafejo?

— Kial la kata kaj bicikla muzeoj en Ŝiauliai estas fermitaj dum dimanĉo?

#### KION MI FARUS ALIE?

— Dum la ekskurso al Nacia Parko



Nacia Parko  
Aukstaitija

Aukstaitija mi estus ŝatinta ke ni iomete pli piedirus.

— Tre mankis al mi flugfolio kun bazaj

informoj pri Esperanto en la litova lingvo kaj kun kontaktuloj en Litovio. Oni neeviteble renkontas kelkajn lokajn homojn.

Tamen, entute mi devas gratuli la organizintojn pro tre bone organizita Universala Kongreso. Dankon. □

## ☺ • odlo bokserp

Odlo Bokserp, nia ĉiam entreprenema subredaktoro, nuntempe ferias ie en Antarktiko. Tamen li sendis al ni lastatempnan foton, por ke ni ne forgesu lin.



kaj ankaŭ jen foto de li eĉ pli malgranda:



## filmorecenzo

# LA SOMERO SENFINA

recenzas Tony Peterson

Kun Robert August kaj Mike Hinson. Muziko originala de La Sandaloj. Informofilmo. Fotografis, Redaktis kaj Rakontis Bruce Brown. 1966.



La Somero Senfina estas kolosa informofilmo kaj estas numero 4 en mia listo de 10 Preferataj Filmoj. Eble estas stranga elekto, sed la filmo estas vere ĝuiga; mi devas inkludi ĝin ĉar estas grandega “veturo” (en ĉiu senco de la vorto) al alia epoko: la 1960’oj.

Baze, la filmo estas fotografia taglibro de du usonaj surfistoj kiuj komencas de Kalifornio, kaj veturas tra la mondo por trovi “la perfektan ondon”. Ni sekvas ilin dum ilia veturo, kaj se ni estas en humoro akceptema, ni havas multan amuziĝon ankaŭ.

La filmo inkludas preskaŭ ĉiom de ilia veturo, sed la fokuso estas sur iliaj veturoj en Norda kaj Suda Afriko, Nov-Zelando, Havajo, Tahitio kaj Aŭstralio.

La filmo havas kelkajn tipajn surfistajn humuraĵojn kiujn kelkaj homoj trovas “malfortaj”, sed entute ĝi devigas min ridi. Unu stulta ekzemplo: La du surfistoj pakas siajn sakojn por la veturo. Unu el ili legas pri ŝarkatakoj. Tiam ni vidas ke la alia el ili pakas nur unu bandaĝan strieton ... por krikokazo! Tipa surfista humoro!

Interese, sed bedaŭrinde por ni, la

nura loko kie la knaboj ne trovas taŭgan surfon estas en Aŭstralio! Dum ilia Aŭstralio veturo ili estas konstante alparolataj de kaj pli junaj kaj maljunaj surfulistoj tiel: “Vi viroj vere maltrafis ĝin. Vi devus esti ĉi tie hieraŭ!”. Ĉi tio vere signifas: “Vi viroj vere maltrafis ĝin. Vi devus esti ĉi tie lastan vintron!”.

Estas multaj ĝuigaj aferoj en la filmo: la lakona rakonto de Bruce Brown; la personecoj de la du surfistoj, Robert kaj Mike; la muziko elvokema; la surfo; la bonegaj fotografio kaj redaktado; kaj la pejzaĝoj ĉiuj kombiniĝas por fari ĉi tion bonega sperto. Ĉi tiu estas unu el la kelkaj filmoj kiuj igus vin vere estimi surftabuladon ... kaj informofilmojn.

Ĝi estas bela ekzemplo de kiel fari filmon imageman kun malgranda buĝeto.

Sed, fine, io por pripensi: Ĉiu el la junuloj al kiuj la du surfistoj parolas estas nun ĉirkaŭ 60-jara! Mi scivolas ĉu ili trovis tiun “perfektan ondon” kiun ili serĉis? Ĉu ili surftabuladas nun? Aŭ ĉu ili mem estas konservativaj maljunaj viroj nun?

Mi preferas memori ilin por ĉiam junaj.

*La Somero Senfina estas vere unu veturo definitive preninda!* □

## film review

# THE ENDLESS SUMMER

by Tony Peterson

Documentary Film. 1966. With Robert August and Mike Hinson. Original music by The Sandals. A Documentary Film Photographed, Edited, and Narrated by Bruce Brown. 1966.



*THE ENDLESS SUMMER* is a terrific documentary and it's my number 4 choice in my list of 10 Favourite Films. Possibly it's an odd choice, but the film is so enjoyable I must include it because it's such a great "trip" (in every sense of the word) to another era: the 1960's.

Basically, the film is a photographic journal of two American surfers who in California, and travel the world to find "the perfect wave". We follow them as they travel, and, if we're in a receptive mood, we have a lot of fun also.

The film includes most of their trip, but the focus is on their journey through North and South Africa, New Zealand, Hawaii, Tahiti and Australia.

The film features some typical surfer humour that some would find a bit "lame", but it always makes me laugh. One silly example: The two surfers pack their bags for their trip. One of them reads about possible shark attacks. Then we see the other one is packing a single "bandaid" ... for emergencies! Typical surfer humour!

Interestingly, but unfortunately for us, the only place the boys can't find a

decent surf is Australia! During their Australian trip they are constantly told by the younger and older surfers alike: "You guys really missed it. You should have been here yesterday!" This really means: "You guys really missed it. You should have been here last winter!"

There are so many good things in the film to enjoy: the laconic narration by Bruce Brown; the personalities of the two surfers, Robert and Mike; the evocative music score; the surf; the sand; the excellent photography and editing; and the scenic locations all combine to make this a great experience. This is one of the few films that will make you really appreciate surfing ... and documentary films. It's a fine example of how to make an imaginative film with a small budget.

But, finally, something to think about: All the teenagers that the two surfers talk to are now about 60! I wonder if they ever found that "perfect wave" they were looking for? Do they still surf? Or are they just ordinary, conservative old guys now? I prefer to remember them as forever young.

The *Endless Summer* is truly one trip definitely worth taking! □

# RESPONDO AL MARCEL LEEREVELD

de Geraldo Mattos

En la numero 76 de *ESK* p.17-19, samideano Marcel Leereveld doktrinas al komencantoj pri punktoj de nia lingvo, sed ne ĉio dirita estas vero, kaj tion mi devas komenti.

Lia unua mistrafo aperas en lia aplomba aserto, kiun ni legas en la unua kolumno de la p.17:

“Of course there [is] in Esperanto a Passive Voice (in spite of the Editor), as there is in other languages.”

Esperanto ne posedas pasivon, sed ni lasu tiun nomon por la simpla ebleco privilegii la rektan objekton en Esperanto kaj la rektan kaj la nerektan en la angla, ĉar kopulo kaj participo identas al kopulo kaj adjektivo: esti amata kaj esti kara, esti finita kaj esti preta, esti falonta kaj esti kaduka... La pasivo estas nur komuna proceduro por doni emfazon al unu el la proponiciaj elementoj, sed estas aliaj manieroj tion fari, kaj la sekvantaj frazoj egale emfazas la saman proponician elementon:

*LA INFANO ESTIS LAVATA DE LA PATRINO.*

*LA INFANON LAV(AD)IS LIA PATRINO.  
TIO ESTIS LA INFANO, KIUN LA PATRINO LAV(AD)IS.*

En la fino de la dua kolumno de la p. 17, li skribas:

“The Active means that the focus is on somebody or something that does

an action, as in ‘She washed the child’ (Ŝi lavis la infanon). The Passive means that the focus is on the receiver of the action: ‘The child has been washed’ or ‘The child was washed’. (I. e., washed by the mother.) Again there is only one action, so one word in Esperanto, marked by a reversing suffix (-at-): ‘La infano lavatis (de la patrino)’”

Tie enestas pluraj eraroj.

La unua estas la implicita egalvaloro inter aktiva kaj pasiva frazoj, sed ili ne estas sencegalaj pro siaj malsamaj subkomprenoj: la aktiva frazo parolas pri infano, kiun lavas patrino, dum la pasiva pri infano, kiun lavas patrino, ne alia homo.

La dua kuŝas en tio, ke la verboformo “lavatis” enhavas la vorton “lavata”, kiu indikas nur la tempon de la daŭro de pasinta, estanta aŭ venonta lavo aŭ lavado... Sekve de tio, la formo “lavatis” neniam respondas al la angla esprimo “has been washed”: ĝusta estus do la formo “lavitis”... Efektive, nia samideano sekrete revenas al la atista maniero indiki la perfektan preteriton per la estanta participo: la infano estis lavata de la patrino = la lavo finiĝis, kaj la infano estis pura. Ni ne forgesu, ke pri tio estis jam decido de la Akademio de Esperanto en 1965, kvankamavigita per ne tre lojala proceduro.

Kaj la lasta vidiĝas en la instruo

mem, ĉar al komencantoj gravas la transdono de ĉio plej grava kaj senkontesta de la lingvo, kaj ne de io ĝis

nun ne oficiala kaj absolute tute ne komunuza. □

## RESPONDE AL JÁNOS PETIK: KIAL LABORI ESTAS BONE KAJ KIAL DORMI ESTAS SAME BONE?

de Rob Moerbeek

PAG, nia aŭtoritata gramatiklibro, klarigas la adverbajn formojn de la kopula predikativo ĉe infinitiva aŭ subpropozicifforma subjekto kiel slavismon:

Rim. Par. 68...en frazoj kiel “resti kun leono estas danĝere” ni trovas kvazaŭ neŭtran formon de adjektivo; sed tio estas nur ŝajno, kaj la uzo de la adverbo venas de la fakto, ke la sola vorto, al kiu “danĝere” povas rilati estas la verbo “resti”. Same kiel “bela kanto” fariĝas “bele kanti”, el “bela estas la kanto” oni transponas “bele estas kanti”.

Tamen ne tute travidebla estas tia rezonado.

Ni ja komparu la akordon ĉe substantivoj, pronomoj kaj adjektivoj: “Ni, esperantistoj estas pacamaj. Evidente ni ellasas elementon, ĉar eĉ la kopula “estas” devenas el la identiga signifo: a = a’. Nu, ni = homoj, do ankaŭ = pacemaj homoj.

Simile “Labori estas bone” estas komprenebla kiel “ = agi bone” kaj “Dormi estas bone” sammaniere klariĝas kiel “ - stati bone”. Samkiel

“homoj” estas malhavebla en “ni estas pacamaj”, ankaŭ “agi” kaj “stati” estas malhaveblaj en “labori/dormi estas bone”. Kio estis demonstranda.

### Alia kritikendaĵo

Nesufiĉa analizo troviĝas en la Rimarko II de par.169 de PAG:

En tiaj okazoj la predikato estas ĉiam esti, aŭ iĝi (ekesti): “iĝis varme”. Sed ili devas esti veraj predikatoj; kiam ili estas infinitivaj komplementoj de alia predikato aŭ de moda help-verbo, oni devas uzi la a-formon: “Pli bone estus esti nenaskita; necesus esti certa pri tio; povus esti ebla, ke li ne venos”.

Dum en la unuaj du ekzemploj la infinitivo klariĝas per “ke oni estus nenaskita” aŭ “ke oni estu certa”, la tria ekzemplo neniel estas reduktebla al -afinaĵa predikativo: “povas esti, ke estas eble, ke li ne venos”. Neniu povas ebligi personon, kiel ajn ofte oni misdiras tion. Eblas nur “ebligi ion al persono”.

Supozeble PAG meritas atentan traileon. □

## noto de la redaktoro

Mi publikigas la “respondojn” al Marcel Leereveld kaj al János Petik iom nevolonte, pro ilia tre kompleksa karaktero. Ne plu temas pri tekstoj por komencantoj, sed pri lingvistika argumentado. Pro tio, mi petas ke la diversaj aŭtoroj pludisputu inter si kaj ne en ĉi tiuj paĝoj. □



## • skribas la legantoj

### TERRY MANLEY SKRIBIS:

*[Terry petis ke mi komentu kaj respondu al la ĉisekvaĵoj, do mi faras tion fine de ĉiu ero. — 10]*

Leginte la pasintajn du artikolojn sub la rubriko “For the Beginner” mi komencas dubi ĉu mi estas progresanta lernanto de Esperanto.

**LA UNUA** estis en la julia-aŭgusta *EPK* kaj estis respondo –far de, -ate de, aŭ verkate de (mi preferas la trian elekton) Marcel Leereveld. La artikolo traktas la pasivan kaj medialan voĉon kun ekzemploj en pluraj lingvoj.

*[“Far” estas proponita sed ne plu multe uzata vorteto. “Fare de” estas duone oficiala esprimo. “Ate de” estas proponaĵo de Marcel, kaj ĝenerale ne konata de la cetera esperantista mondo. “Verkate de” estas lingva eraro: devas esti “Verkita de”, se la celo estas esprimi “(something was) written by”. — 10]*

**LA DUA** estis malerarigo de traduko korektate de\* Donald Broadribb kun la invito “Beginners or near beginners are invited to correct the text.” Komence mi pensis (nehumile) “Ah mi estas progresanto, do mi ne legos.” Sed provin-

te la ekzercon mi konstatis, ke mi ne bone poentumis. Mi mistrakis kelkajn erarojn.

*\*[devas esti “korektita de” — 10]*

Do mia demando estas: ĉu la rubriko “For the Beginner” povus fortimigi novulojn el la movado pro la malfacileco de la artikoloj? Aŭ ĉu mi estas ĉiama komencanto kiu malprogresas?


*[Vi pravas pri tio ke la artikoloj ja estis tro komplikaj por komencantoj. — 10]*

**Pri la dua artikolo “Bazaj reguloj por katoj kiuj volas regi domanaron” mi havas demandojn:**


**LINIO 8.** Ĉe “Se vi havas fiŝodoran elspiron, ju pli bone.” Kion esprimas la vortoj “pli bone”?

*[Mi supozas ke la anglalingva originalo diris “If you have a fishy smell, all the better”. La traduko devus esti “des pli bone” por tiu senco. Mi forgesis mencii tion en miaj “korektoj” — 10]*


**LINIO 9.** ĉu “kontraŭfrotas” anstataŭ “preterfrotas”? Preterfrotas ŝajnas esti kontraŭaĵo de proksimeco (frotas) kaj malproksimeco (preter).

[NPIV rimarkigas ke “preter” supozigas movon: “(to go) beyond”. Supozeble la anglalingva originalo diris “rub against” = “kontraŭfrotas”. — 


**LINIO 12** ĉu ‘inter la teleroj’ anstataŭ “tra la teleroj”? Eble gramatike TRA estas akceptinda, sed mi preferus INTER.

[Ankaŭ mi; tamen gramatike “tra” estas akceptebla. — 

Krome mi ĉiam havas ian problemon pri la uzo de tra kun la “n” de direkto. Eble pro la fakto ke “tra” iel donas sencon de moviĝo en si mem. Se mi skribas “Li saltas tra la ringegon”, tio estas sufiĉe klara. Iufoje mi deziris diri “Li grimpis tra la fenestron” sed iu avertis min ke tiel estas malĝuste. Mi eĉ deziras diri “Mi rigardis tra la fenestron” ĉar mi havas ian sencon pri la direkto de la lumo tra la fenestron al mia okulo. Troe ĉu ne? Pri “trans” ne-probleme.

[NPIV komentas ke “tra” povas indiki aŭ movon interne de io, aŭ ankaŭ pluen; ĝi proponas klarigi per uzo de -n por tiu dua senco. Miaopinie, viaj tri ekzemploj ĉiuj estas ĝustaj. — 


**LINIO 20** mi preferas “escepte se vi povas kuŝi...” anstataŭ “krom...” Ĉu mi tro influigis de Marcelo?”

[Krom = “apart from”. Krom se = “unless” — 

### Aliaj demandoj prilingvaj


Mi scias iomete pri la proceso enkonduki novajn vortojn en la lingvon.

Temas pri Akademia decido ĉu ne?


[Ne. Estis preskribite ke la Akademio ne rajtas enkonduki aŭ proponi novajn vortojn. Ĝi nur rajtas oficialigi vorton, kiam ĝi trovas ke tiu vorto estas jam delonge uzata kaj ĝenerale akceptata kiel normala parto de la lingvo. — 

Kie publikiĝas listo de oficiale akceptitaj vortoj?


[Ĉe la retsito de la Akademio:

[www.akademio-de-esperanto.org](http://www.akademio-de-esperanto.org) troviĝas listo. Krome, PIV kaj NPIV indikas pri ĉiu vorto ĝian oficialecon aŭ neoficialecon. — 


Ĉu tia decido estas fina?

[Jes. — 

Ĉu la Akademio foje pridiskutas la forĵeton de antaŭe akceptitaj vortoj?

[Frue en la 20a jarcento ĝi ja ŝanĝis kelkajn decidojn; sed dum la posta tempo, ne. Estas opiniata ke estas preferinde deklari vorton “pli moderna” anstataŭ maloficialigi pli frue oficialigitan terminon. 

Iuj vortoj gratas ĉe mi. Dum mi studas pri naturo kaj ties sciencoj mi pensas “kial ‘geologo, ornitologo,’ ktp. anstataŭ ‘geologisto, ornitologisto?’”

[La vortoj geologio kaj ornitologio estis oficialigitaj ĉ. 1920. La vortoj geologo kaj ornitologo estis oficialigitaj ĉ. 1960. Vi certe rajtas diri geologiisto kaj ornitologiisto se vi preferas. — 

Mi rimarkis ke oni elektis “flamengo” por flamingo. Kial oni ne elektis



Kormorento (kiel Marcelo sugestis) anstataŭ kormorano?

*[La nomo donita de Zamenhof estas fenikoptero. "Flamengo" estis nur ies propono, kaj ne estas oficiala vorto. Kormorano estas neoficiala vorto; tiu birdo ankoraŭ ne havas oficialan nomon esperantan. La vorto kormorano baziĝis sur la franca nomo de tiu birdo, "cormoran". — [a]]*

Kiel vorto kia "diamanto" akceptiĝis en la lingvo, kiam ĝi havas signifon alian?

*[Diamanto estis oficialita per Fundamento de Esperanto kaj estis bazita sur la franca vorto "diamant" kaj la germana "Diamant". Kvankam teorie oni povus analizi tiun vorton kiel "di-amanto" = "amanto de dio", klare Zamenhof ne opiniis tion verŝajna problemo. Generale, lin ne*

*ĝenis tiaj eblaj signifo-konfliktoj. Ja geologio kaj religio malofte interkonfuziĝas! — [a]]*

Mi scias ke Esperanto ne estas perfekta, sed ĉu ni ne gardu kontraŭ duoblaĵojn?

*[Kial? Zamenhof ne sentis ĝenon pro tiaj "duoblaĵoj". Laŭ li la internacieco de vorto estas multe pli grava ol teoriaj problemoj pri dusignifaĵoj. Mi opinias ke li pravis. Krome, mi dubas ke eblus tute eviti tiajn "duoblaĵojn" — [a]]*

Kiel mi menciis en Telopeo mi serĉas la birdliston de Wre Chandler. Ĉu tiajn vortojn kiajn nomojn de birdoj la Akademianoj decidas? Aŭ ĉu ili havas komitaton por rekomendi tiajn?

*[La Akademio ne rajtas rekomendi novajn vortojn, nek proponi ilin. — [a]]* □



## • for the beginner

by Donald Broadribb

### WHAT IS THE ACADEMY OF ESPERANTO AND WHAT DOES IT DO?

When Esperanto was introduced to the public just 118 years ago, it was the brain child of a Jewish ophthalmologist named Ludwik Lejzer Zamenhof, then working in Warsaw. Within a short time Esperanto was taken up by a large number of people, and put to practical use. Books and magazines were published in it, clubs to practise speaking the language were established, a few brave folk took international trips to

test out its usefulness in conversing with foreign Esperanto students. By the early 1900s it had even reached Australia.

In 1905 the first formal International Congress to be held in Esperanto took place in Boulogne-sur-Mer, France. At this Congress it was proposed and accepted that a body to oversee the development of the language be established. Dr Zamenhof

had long felt that Esperanto should be the possession of all humanity, not a personal project of his own.

A group called the “Language Committee” (*Lingva komitato*) was elected, and it in turn set up a sub-group called the Academy of Esperanto (*Akademio de Esperanto*). At the same time, a book titled “Foundations of Esperanto” (*Fundamento de Esperanto*) was proclaimed as providing the basic guidelines of Esperanto grammar, vocabulary and usage. *Fundamento de Esperanto* was compiled from several Esperanto source books published over the preceding 17 years. It contained a preface setting out its purpose and also a plan for the further development of Esperanto.

The *Lingva komitato*, and specifically its subdivision the *Akademio de Esperanto*, was charged with answering questions about Esperanto linguistics, especially questions of grammar, and keeping track of the development of vocabulary so that students of the language could be sure that their Esperanto dictionaries and textbooks agreed with each other, regardless of where in the world they were published.

*Fundamento de Esperanto* included a basic list of around 4000 language elements in Esperanto, with translations into French, English, German, Russian and Polish, but, it should be noted, not definitions. This basic list, called the *Universala vortaro*, together

with many examples of usage (called the *Ekzercaro*), was the official basis of Esperanto vocabulary. A very short sketch of Esperanto Grammar, in the French, English, German, Russian and Polish languages, described the basic grammatical structure of Esperanto.

Because Esperanto continued to develop over the years, as it came into ever wider use, the principal task of the *Akademio de Esperanto* became keeping track of language usage, and from time to time determining that a particular grammatical usage, or word, had come into such common use as to warrant being officially added to the lists in *Fundamento de Esperanto*. These decisions are published in a series called “Addition to the *Fundamento de Esperanto*” (*Oficiala Aldono*), at varying intervals of about ten or twenty years. The last such publication was in 1975, the “8th Official Addition” (*8a Oficiala Aldono*) in which your editor had a hand — being at the time one of the Members of the *Akademio de Esperanto*.

Until the post 2nd World War period, it was customary for the *Akademio* to publish the newly officialised words in lists which gave translations into French, English, German, Russian and Polish, but no definitions as such, following the model in *Fundamento de Esperanto*. However, in the post-war period it was realised that official definitions are seriously needed, and

the *8a Oficiala Aldono* began the process of compiling such an official dictionary.

The *Akademio* is currently engaged in compiling and publishing (on the Internet) a set of official definitions for the 4748 Esperanto elements so far in the official lists. Those interested can find the work done so far at the Internet website of the *Akademio de Esperanto*:

[www.akademio-de-esperanto.org](http://www.akademio-de-esperanto.org)

There is a common misunderstanding among the public, that the *Akademio* could, or should, itself propose and officialise new terms, for example, an ornithological word list, or lists for other technical fields. This the *Akademio* has no authority to do.

Nor does the *Akademio* have any authority to discuss orthographical issues (the Esperanto alphabet), to alter in any way the grammar of Esperanto, or to initiate any other matter which would change the character of the language. Any changes must arise from sustained public usage, which the *Akademio* may after due consideration declare to have been so generally accepted by the educated Esperanto community as to have become a standard part of Esperanto.

*Fundamento de Esperanto* states that Esperanto is to evolve through popular usage, not under any institution's official direction. The *Akademio de Esperanto* is bound by its statutes to respect this stated principle of

the way in which Esperanto evolves. In other words, Esperanto is on the same level as any other language: subject to popular usage and development. The *Akademio* serves as a recording agency, keeping track of current usage.

In its role as arbitrating grammatical disputes, the *Akademio acts as an interpreter of Fundamento de Esperanto*. In 1967 it made a major decision on the use of the *-ita* and *-ata* participles. It has also clarified the use of the pronoun *SI*, of the word *PO*, summarised the principles of word construction in Esperanto, and made recommendations on the use of proper names, particularly the names of countries. It has also made a decision confirming the use of the word *DE* in the meaning of “by” in such phrases as “written by”, and made occasional other clarifications and recommendations.

The *Akademio* also has a “consultancy” (*konsultejo*) devoted to answering individual persons' questions about grammar or vocabulary. Details of how to use this service are given at its website.

## Unofficial sources

Until after the Second World War the *Akademio* made no attempt to work out a set of official definitions of the Esperanto vocabulary as a whole. For a long time it was felt that the Esperanto community was small enough for a general consensus to be reached among dictionary makers

without any official intervention.

However, various attempts were made at compiling an all-Esperanto dictionary of the language, and in 1930 the book *Plena Vortaro* (“Complete Dictionary”) was published by the *Senacieca Asocio Tutmonda*. Although with no official status, that dictionary quickly became a standard reference book. It was reprinted and revised at various times.

The present version of that dictionary is the *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005*. This dictionary, which is entirely in Esperanto, lists and defines all of the official Esperanto vocabulary, and all of the popular and specialised vocabulary in current use but not as yet officialised, plus proposals for terms in many specialised fields. It indicates for each term whether or not it is an officialised term, and, if officialised, whether it was officialised as part of the *Fundamento*, or by the *Akademio de Esperanto*.

This dictionary has no official status, but is the standard reference dictionary at the present time.

As standard, but unofficial, reference books for Esperanto grammar, two books stand out. Both are entirely in Esperanto. Again, it must be emphasised that although widely used, they are not the “final word” on Esperanto usage.

The first is *Plena Analiza Gramatiko* by K. Kalocsay and Gaston Waringhien, published in its 5th edition in 1985. Unfortunately, this book is at present out of print.

The other is *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* by Bertilo Wennergren, currently available in its 13th edition on the Internet at

<http://bertilow.com/pmeg/>

Plans to publish this nearly 700 page volume in book form were announced in 2005, but as yet seem not to have materialised. □

## ✎ por ridigi vin ✎

Malgranda Evo verkis eseon pri tio, kio okazis hejme:

“Avinjo, kiu estas televidsklavino, iun vesperon akcidente ŝaltis la radion, kaj ekkriis: ”Mi blindiĝis!”

[El Tamen Plu]

### EL LA ONDO DE ESPERANTO

Sciencistoj asertas, ke ec la plej kleraj homoj uzas nur parton de siaj cerboj: en la Esperanto-movado ni uzas nur malgrandan parton de la kolektiva cerbo de niaj membroj pro la malata komprennivelo de tiuj personoj. (Pola Radio, *Trarigardo de la Esperanto-Gazetaro*, 2 feb 2004. <http://www.radio.com>)

Se ekzistas homoj, kiuj ne sukcesas kredi je la atingopovoj de Esperanto, kial ili sekvas... partoprenante la renkotiĝojn...? (Ĝangalo, <http://www.ĝangalo.com>, el ero intertempe forprenita)

# INDEKSO DE

## ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO 2005

73 = januaro-februaro 2005

74 = marto-aprilo 2005

75 = majo-junio 2005

76 = julio-aŭgusto 2005

77 = septembro-oktobro 2005

78 = novembro-decembro 2005

### Artikoloj:

“Aidoso en Aŭstralio” de László Farkas. 76:23

“Kio estas hajko?” de Tony Peterson. 77:8

“La pac-boato” de Penny Vos-Pym. 73:10

“Mia nova ŝatokupo: savado de malnovaj rozoj” de Margaret Furness. 76:4

“Ni havas familion!” de Katja Steele. 75:29

“Noticoj pri la Nitobe-simpozio en Vilno en aŭgusto 2005” de Trevor Steele. 77:23

“Pri ĉirkaŭ la domo” de Erhard Claus. 76:15

“Pri la pretigado de ESK” de Donald Broadribb. 77:15

“Raporto el Indonezio” de Hazairin R. Junep. 77:21

“Vizito al historia Melburno” de Franciska Toubale. 78:14

**Deziras korespondi:** 74:12, 75:11

**Ekzamenoj: Sukcesintoj:** 76:13

### Esperanto-reklamado:

“Eksteren” de Katja Steele. 74:11

“En Adelajdo reklamiloj dupiedaj kaj flugantaj” de Katja Steele. 75:19

### Filmo-recenzoj:

Ciferumu “M” por murdo, rec. Tony Peterson. 76:24

Jason kaj la Argonaŭtoj, rec. Tony Peterson. 77:10

La pasiono de la kristo, rec. Tony Peterson. 74:17

La somero sengina, rec. Tony Peterson. 78:19

La tago kiam la mondo haltis, rec. Tony Peterson. 73:18

**Financa raporto de AEA:** 74:27

### For the Beginner:

“Bazaj reguloj por katoj kiuj volas kontroli

domanaro” + Corrections. 77:26

“Some Different Thoughts for the Beginner” by Marcel Leereveld. 76:17

“The Akademio de Esperanto” by Donald Broadribb. 78:25

“Word”; A Beginner’s Guide to the Use of -n (by Donald Broadribb): 73:21, 74:19

**Instruado:** Scholarship Program. 73:15; 78:7

**Interrete:** 73:8, 74:22, 76:29, 77:9-10,29

### Kongresoj:

Ĉu la Universalaj Kongresoj estas elitaj? de Ŝandor Horvath. 78:17

Kongreso de NZEA 2006 . 78:5

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de AEA, Adelajdo Januaro 2005. 75:23

### Konkursoj:

Nia konkurso “facila” (respondoj): 73:12, 74:22

Nia konkurso “nefacila” (respondoj): 73:12

Speciala konkurso: 76:9, 77:30

### Lingvaj temoj:

“Defende de ‘naturaj’ formoj” de János Petik. 76:10

“La ĉefaj obstakloj de progreso” de Johano Petik. 75:13

“Mallonga klarigeto” de Marcel Leereveld. (77:17)

“Pri la ‘fidebleco’ de Lingvoj” de Johano Petik. 73:16

“Pri la vorto ‘krom’” de L. L. Zamenhof. 73:11

“Responde al János Petik”, de Rob Moerbeek. 78:22

“Responde al Marcel Leereveld”, de Geraldo Mattos. 78:21

### Lokaj eventoj:

Adelajdo eksperimentis (de Trevor Steele)

77:29

La unua seminario 2005 (Melburno) (de Franciska Toubale) 76:30

Vizito al Torquay (Viktorio). (De John Adams) 75:18

Zamenhofa festo en Viktorio. (De Franciska Toubale) 74:12

**Odlo Bokserp:** 74:27; 78:18

**Personoj:**

AEA-estraro (fotoj). 75:20

Bishop, Jennifer: “Unuaj travivaĵoj en Japanujo”. 75:9

Dwyer, James. 78:16

Felby, Audrey: intervjuo farita de Katja Steele. 77:5

Felby, Bob (fotoj). 76:27

Felby, Bob: intervjuo farita de Katja Steele. 78:12

Ferrand, Claude: vizito al Aŭstralio

Manley, Terry: intervjuo farita de Katja Steele. 74:23

Masayuki, Saionji: morto de. 77:13

Milani, Ali B.: morto de. 76:14

Murphy, Dennis: “Akcidento de Historio”. 77:3

Otsuki, Masayuki: vizito al Perto. 73:25

Pescod, Don: morto de. 77:16

Poulson, David: morto de. 78:10

Robertson, Robbie. 74:5

Rosbach, Johan Hammond: morto de. 73:19

Steele, Trevor: en Hindio (foto). 73:14

Steele, Trevor kaj Katja: en Hindio (raporto de Venkatesh Reddy) 76:11

Toubale, Franciska: “Mia vizito al Nepalo”. 76:3

**Poŝtmarkoj esperantaj:**

Esperanto en aŭstralio poŝtmarko. 75:22

Nova poŝtmarko aŭstria. 73:25

**Prezidanto, informoj de la:**

Almembraraj informoj elstaraj. 76:16

Peto de la prezidanto. 74:14

**Rakontoj:**

**Ĝeneralaj:**

“La tekruĉoj de Suna Angulo strikas!” de

Tony Peterson. 75:4

“Religio lerneja” de Terry Manley. 75:3

“Toki” de Patricia Grace. 76:20

**Ŝercaj:**

“Ili sukcese provis ĉiujn erarojn” de Franciska Toubale. 74:9

“La rozkolera aŭtoro” de Vera Payne. 75:11

“Pli aŭ malpli” de Gaye Phillips. 73:3

**Recenzoj:**

*Diverskolore* de Trevor Steele. (Rec. Donald Broadribb). 78:8

*Gerda malaperis* de Claude Piron. Havebla pervoĉe sur KD. 77:7

*Interlinguistics and Esperanto Studies: Paths to the scholarly literature*, de Detlev Blanke. (Rec. Donald Broadribb) 74:15

*La fotoalbumo volumo 2* de Trevor Steele. (Rec. Donald Broadribb). 78:8

*La kastelo de vitro* de John Francis. (Rec. Donald Broadribb) 74:15

*Malgrava historieto pri mia vivo*, de Bob Felby. (Rec. Marcel Leereveld) 75:21

*Mummy, Why Can't We All Speak the Same Language* by Nicold Else. (Rec. Marcel Leereveld). 77:18

*The Hidden Perverse Effects of the Current System of International Communication*, by Claude Piron. (Rec. Donald Broadribb) 74:15

**Novaj libroj:** *La brusela bubo*, *Diverskolore*, *La fotoalbumo vol.2*. 77:15

**Skribas la legantoj:**

DESAILLY, Paul: 75:16

FOX, Brian: 75:16

MANLEY, Terry: 78:23

MAZODZE, Oliver: 74:11

TOUBALE, Franciska: 75:17

**Somerkursaroj:**

2004—La 20a esperanto-somerkursaro de A.E.A. 74:3-7

Opinio (de Terry Manley). 76:29

Pri “Opinio de Terry Manley”. 77:6

21a somerkursaro 2006 78:3

Pri la somerkursaro (de Igor Couto). 78:6

# Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Sendu al: [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au), aŭ PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

Limdato por la novembro-decembra numero: 10a de decembro 2005

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.



## La Aŭstralia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Australia

<http://www.esperanto.org.au/>

**Prezidanto:** Marcel Leereveld | [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

**Sekretario:** Miranda Lutz | [sekretario@esperanto.org.au](mailto:sekretario@esperanto.org.au)

**Kasisto:** Stephen Pitney | [kasisto@esperanto.org.au](mailto:kasisto@esperanto.org.au)

**Membreco:** \$30 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por sudento aŭ pensiulo: \$20. Asocia membreco: \$10.

Pagu al la Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



## La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • New Zealand

<http://www.esperanto.org.nz/>

**Prezidanto:** Bradley McDonald | [bradley.m@xtra.co.nz](mailto:bradley.m@xtra.co.nz)

**Kasisto:** Jackie Fox

**Sekretario:** Howard Gravatt | [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Membreco:** \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70.

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

**Print Post Approved:**

**PP631048/00005**

**SURFACE  
MAIL**

POSTAGE  
PAID  
AUSTRALIA